

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASGĈIO ESPERANTISTA

REDAKĈIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20--; fremdlando Kĉ 25-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271.

RUD. HROMADA,  
ĝen. sekr. de Ĉ. A. E.

## NI ELIRU EL IZOLECO!

De la tempo kiam mi fariĝis esperantisto — kaj la venontan jaron pasos jam 20 jaroj de tiu bela printempo — mi povis vidi, ke ĉefa temo de ĉiuj kongresoj esperantis aj estis la organiza „problemo“. Mi ne memoras plu la sinsekvon de unuopaj stadioj de ĉi tiu tre „ŝatata“ temo, sed unu impresio restis al mi: tedaĵo por simpla esperantisto. Tiom pli mi kaj al mi similaj simpluloj salutis la sciigon, ke dum la kongreso en Helsinki la interkonsento estis atingita kaj ni esperis, ke de nun ni okupos nin, dum niaj kunvenoj, per aliaj gravaj aferoj. Tamen ankoraŭ pliajn jarojn daŭris la likvido de tiu ĉi afero kaj nur en Geneve, en Aŭgusto 1925, ni povis libere elspiri, ĉar la lasta tasko: akcepti la internan regularon de Konstanta Reprezentantaro, estis farita.

Oni parolis pri ĝi sate en Parizo, poste la naciaj societoj ĝin konfirmis, sekve la afero estis fakte preta jam antaŭ Genevo. Tamen du naciaj societoj, la pola kaj la franca, ne estis konsentaj kun tio, kion akceptis ĉiuj ceteraj naciaj societoj, sed oni esperis, ke ili, vidante ke ĉiuj aliaj havas jam sufiĉe de la formalajoj, cedos kun siaj proponoj pri ŝanĝoj almenaŭ por iu tempo, dum kiu la nova ordo proviĝos, kaj ke ili ebligos tiel al la ceteraj, laboravidaĵoj, ke ili fine povu dum internaciaj kunvenoj trakti ne plu pri formalajoj, sed pri *konkretaj, praktikaj urĝaj aferoj*, da kiuj nia movado havas ja sufiĉe. Tiu nia atendo bedaŭrinde montriĝis naiva, denove naciaj societoj ricevas el Parizo cirkulerojn, kiuj klopodas pruvi, ke neniel ni venkos, se paragrafo x tekstos tiel kiel akceptite, ke por ni la plej grava kaj la plej urĝa afero estas denove ŝanĝi regularon, alie ili estos devigataj aranĝi sin laŭ si mem.

Ni do esperas, ke en Locarno, dum tiu speciala kunveno de K. R. oni trovos vojon por kontentige solvi tiun ĉi vivo-problemon.

Sed ne malpli ni esperas, ke tempo sufiĉa restos por io alia:

*Naciaj Societoj devas eliri el sia izoleco.* Ilia agado estas ja limita per regnaj limoj. En ili grupiĝas kluboj kaj individuaj esperantistoj el senklubaj lokoj troviĝantaj en tiu kaj tiu regno. Ilia agadmaniero ofte, diferencigas de la agado de iliaj sam-

roluloj en aliaj teritorioj, sekve de alia medio, de aliaj kondiĉoj, eĉ de alia celkoncepto.

Sed ĉu vi ne opinias, ke estas granda malŝparo de energio, se ĉiu el ili vivas kvazaŭ por si mem, izolite, sen iu ajn kontakto kun la aliaj? Se spertoj akiritaj en unu lando restas kaŝitaj en la lando mem, aŭ eĉ nur en la komitato de la respektiva Nacia Societo, precipe de tiuj jam longe ekzistantaj, havantaj jam multajn jarojn da agado? Kaj se, aliflanke, aliaj societoj precipe junaj, ne povas uzi iliajn spertojn, sed devas komenci ĉion „de la komenco“?

Tia stato ŝajnas al ni primitiva, tre simila al tiu, kiu ekzistis en ĉiu lando antaŭ ol naciaj societoj estis kreitaj. Tiam ĉiu loka klubo vivis por si mem. Ĝiaj spertoj, ĝiaj sukcesoj restis nekonataj al la ceteraj. Same ĉe la naciaj societoj nun. Ofte eĉ iliaj sukcesoj restas nekonataj al la cetera mondo.

Kaj la sekvoj de tiu ĉi stato? Por grava afero, kiu povis doni al nia afero sukceson ĝis nun neniam atingitan, ni bezonis havi dokumentojn el plej diversaj landoj. Ne estis eble ilin ricevi. Tio ankaŭ devas ŝanĝiĝi. Ĝenerala Sekretariejo de I. C. K. en Genevo estu loko, kie koncentriĝos ĉiu nia milita materialo. Pasis jam tempo de belaj paroloj kaj promesoj, venis la tempo, kiam ni bezonas dokumenti niajn asertojn. Sed ni devas aranĝi, ke en la okazo de urĝa bezono ICK ilin havu por povi nin helpi per ili.

La kunvenoj en Locarno espereble havos la tempon por fari la necesajn interkonsentojn en tiu ĉi rilato. Nur estas grave, ke la gvidantaj laborantoj el ĉiu lando tie ĉeestu kaj ni tre ŝatus vidi tie reprezentantojn el la mez- kaj orient-eŭropaj naciaj societoj. Kaj ni esperas, ke tiam ankaŭ por ni rezultos el tiuj kunvenoj spirito de Locarno, spirito de solidara reciproka kunlaborado por unu komuna celo.

— Pro la laboroj antaŭ la ĝenerala kunveno de ĈAE malfruiĝis tiu ĉi n-ro, pro kio ni petas pardonon de niaj legantoj.

— La 3. (marta) n-ro aperos ankoraŭ en tiu ĉi monato.

— Granda parto de abonantoj ne renovigis ankoraŭ sian abonon. Ili bv. tion fari almenaŭ nun.


**LITERATURO**


E. KELLOGG:

**REGULUS AL LA KARTAGANOJ**

Radioj de la leviĝanta suno jam oris la altajn kupolojn de Kartago kaj donis per sia riĉa, mola lumo nua con de beleco eĉ al la minacaj remparoj de la ekstera haveno. Sirmitaj per la verdantaj bordoj, cent trimoj naĝis fiere ĉe siaj ankroj, kun siaj latunaj bekoj fajrerantaj sub la suno, kun siaj flagoj dancantaj en la matena vento, dum multe da frakasitaj tabuloj kaj traboj atestis pri batalegoj kun la ŝiparoj de Romo.

Nenia sono de komerco aŭ festado aŭdiĝis el la urbo. La metiisto forlasis sian stablon, la juĝisto sian juĝejon, la pastro sian sanktejon kaj eĉ la severa stoiko eliris el sia kaŝiteco por sin miksi kun la amaso, kiu, maltrankvila, ekscitita, kuregis al la senatdomo, alarmita per la famo, ke Regulus revenis Kartagon.

Pluen, ĉiam pluen, subpremante unu aliajn sub la piedoj, ili kuregis, furiozaj de kolero, kaj avidaj venĝi. Patroj tie estis, kies filoj ĝemis en katenoj; knabinoj, kies amantoj, malfortaj kaj vunditaj, agoniis en karceroj de Romo; kaj grizharaj viroj kaj virinoj, kiujn la Roma glavo lasis senidaj.

Sed kiam la severaj trajtoj de Regulus vidigis, kaj lia kolosa figuro, alte super la ambasadoroj, kiuj revenis kun li el Romo, kiam la sciigo pasis de lipo al lipo, ke la timita militisto ne sole nekonsilis al la Roma senato konsenti interŝanĝon de kaptitoj, sed kontraŭe instigis persekuti, kun ekstrema venĝo Kartagon kaj Kartaganojn, — la popolo balanciĝadis kiel arbaro sub ventego, kaj la rabia malamo de tiu tumulta amasego ellasis sin per ĝemoj, malbenoj kaj krioj pro venĝo. Tamen trankvila, malvarma, neŝancelebla kiel marmoraj muroj ĉirkaŭ si staris la Romano; kaj li etendis la manon super tiu freneza anaro, kun gesto tiel fiere komanda, kvazaŭ li ankoraŭ starus fronte de l'brilaj kohortoj de Romo.

La tumulto ĉesis; la malbeno, duonmurmurita, ne pasis la lipojn; kaj tiel intensa estis la silento, ke la sonorado de la latunaj mankatenoj sur la karpeoj de la kaptito atingis akre kaj plene ĉiun oreilon en tiu vasta kunvenintaro, dum li jene alparolis ilin:

„Vi sendube pensis — ĉar vi juĝas pri la Roma virteco laŭ la via — ke mi rompos mian jurpromeson, prefere ol, reveninte, akcepti vian venĝon. Se la hela sango, kiu plenigas miajn vejnojn, transdonita libere el diecaj prapatroj, similus al tiu ŝlimaĉo, kiu malfluas en arterioj viaj, mi estus restinta hejme kaj rompinta mian jurpromeson por savi la vivon.

Mi estas Roma civitano; tial mi revenis, por ke vi faru vian volon sur tiun ĉi mason da karno kaj ostoj, kiun mi ŝatas ne pli alte, ol la ĉifonojn ĝin kovrantajn. Ĉi tie, en via ĉefurbo, mi vin spitas. Ĉu mi ne konkiris viajn armeojn, ne ekbruligis viajn urbojn kaj ne trenis viajn generalojn ĉe miaj ĉaroradoj, de kiam miaj junulaj manoj unuafoje povis uzi ponardegon? Kaj ĉu vi pensis, ke vi vidis min kurbigi de teruro antaŭ venkita. frakasita senato? Ŝirado de karno kaj fendado de muskoloj estas nur amuzajo kompare kun la angoro spirita, kiu skuas mian korpon.

La luno ĝis nun apenaŭ malkreskis, de kiam plej fieraj el la hieraj matronoj de Romo, la patrino, sur kies brusto mi dormis kaj kies bela frunto tiel ofte kliniĝadis super mi, antaŭ kiam la bruo de batalo boligis mian sangon aŭ la laborego de milito hardis miajn muskolojn — ŝi per ama memorigo pri pasintaj horoj petegis, ke mi restu. Mi vidis ŝin, kiu, kiam la patrujo vokis min al la kampo, bukis al mi la armaĵojn per tremantaj manoj, dum la larmoj torentis sur la malmola, kiras-skvamojn — mi ŝin vidis ŝiri la grizajn harojn kaj bati la grandaĝan bruston, dum sur la genuoj ŝi petegis min ne reiri Kartagon; kaj la tuta kunveninta senato de Romo, seriozaj maljunuloj, faris al mi tiun saman pe-ton. La etaj turmentoj, kiujn vi tenas por bonvenigi min estas antaŭ tio, kion mi jam eltenis, nur kiel murmuro de somera rivereto kompare kun la furioza muĝo de koleraj ŝaŭmondoj ĉe roka marbordo.

Hieraŭ nokte, kuŝante katenita en mia karceroj, mi aŭdis strangan, minacan sonon: ŝajnis kvazaŭ malproksima marŝado de iu vasta armeo, kun sonorado de armiloj, kiam subite staris apud mi Xanthippus, la sparta generalo, per kies helpo vi konkiris min, kaj kun voĉo mallauĝa, simila al solena vento ĝemanta tra senfolia arbaro, li jene alparolis min: „Romano, mi venas admoni vin, ke vi malbenu, per via agonio spiro, tiun ĉi falontan urbon; sciu, ke en malbona

momento la Kartagaj generaloj, koleregaj ĉar mi konkiris vin, ilian konkirinton, plej krime mortigis min. Kaj poste ili provis makuli mian plej brilant honoron. Sed pro tiu fia faro la furiozo de Jupitero trafas ilin nun kaj por ĉiam". Kaj tuj li malaperis.

„Nun do iru, alportu viajn plej akran turmentojn. La malfeliĉoj, kiujn mi vidas pendi super tiu ĉi kulpa regno, estas sufiĉaj por dolĉigi la morton, kvankam ĉiu nervo kaj arterio estus lankena doloro. Mi mortas! Sed mia morto montriĝos fiera triumfo; kaj pro ĉiu guto da sango, kiun vi eliros el miaj vejnoj, via propra fluos rivero. Ve al vi, Kartago! Ve al la fiera urbo de l'akvoj! Mi vidas ĝiajn nobelojn plorkriantaj antaŭ la piedoj de Romaj senatanoj, ĝiajn regnantojn en teruro, ĝiajn ŝipojn en flamoj! Mi aŭdas la venkajn kriojn de Romo! Mi vidas ĝiajn aglojn fajrerantaj sur viaj remparoj! Fiera urbo, vi estas kondamnita! La malbeno de Dio estas sur vi — daŭra dezertiga malbeno! Ĝi ne forlasos viajn pordegojn, ĝis malsataj flamoj delekos la oron de viaj fieraj palacoj kaj ĉiu rivereto fluos ruĝa en la maron!“

Trad. Herbert M. Scott (Boston, USA)



JAN NERUDA:

### BIOGRAFIOJ DE SANKTULOJ.

Eĉ Dio mem tre ŝatas „memorlibrojn.“ Al ĉiu homo donas Li folion, sur kiu skribas hom' dum sia vivo. Folio unu estas griza, nuba, la dua sange ruĝa nur de honto, la tria ridas kiel freŝa rozo, kaj kvara estas klara, paca, sankta, skribita kvazaŭ per brilanta lakto. Ĉi tiujn blankajn Dio poste prenas, kunkudras ilin per fadeno suna kaj metas ilin en bibliotekon.

Per kio sin okupu la anĝeloj?  
Nu, venas ili, legas, ekoscedas,  
kaj ofte ili eĉ komencas plori,  
la larmoj fluas trans iliajn vangojn,  
kaj jen subite varma guta pluvo  
ekfalas sur la teron surprizitan —  
kaj hela tamen estas la ĉielo.

Kaj homo haltas kaj rigardas supren,  
skuante sian rondan homan kapon...

Tradukis M. Lukáš.

## EL SCIENCO

Dro Stan. Kamaryt:

### KOLORILOJ

(Barviva, colorants, matières colorantes.)

Mi publikigas ĉeĥe-esperante francajn listojn de nomoj de koloriloj laŭ ĉeĥa-franca vortaro de prof. *Voitoček*. Mi pensas tian kunigon de teknikaj nomoj tre utila, tial mi lasis ankaŭ la francajn terminojn, por ke la listo estu uzebla ankaŭ de la ne-ĉeĥoslovakaj esp-istoj.

*Čerň* = nigro, un noir

- *acetylenová*, nigro acetilena, le noir d'acétylène.
- *anilinová*, nigro anilina, le noir d'aniline.
- *antimonová*, nigro antimona, le noir d'antimoine.
- *kostní*, nigro osta, le noir d'os.
- *lampová*, nigro lampa, le noir de lampe.
- *platínová*, platinnigro, le noir de platine.
- *révová*, nigro vinbera, le noir de vigne.
- *spodiová*, nigro spodia, le noir animal.
- *tiskařská*, nigro presa, l'encre d'imprimerie.

*Červeň* = ruĝo, un rouge

- *anglická*, kolkotaro, le rouge, colcothar.
- *chromová*, ruĝo kroma, le rouge de chrome.
- *kadmiová*, ruĝo kadmia, le rouge de cadmium.
- *turecká*, ruĝo turka, le rouge turc.

*Modř* = bluo, un bleu

- *anilinová*, bluo anilina, le bleu d'aniline.
- *berlínská*, bluo prusa, berlina, le bleu de Prusse.
- *brémská*, bluo Bremena, b. Péligot, le bleu de Brême, le bleu Péligot.
- *egyptská*, bluo egipta, le bleu égyptienne.
- *horská*, bluo montara, le bleu de montagne.
- *kobaltová*, bluo kobalta, la bleu de cobalt.
- *kobaltová* (pro malbu na porculán), bluo azura, le bleu d'azur.
- *metylénová*, bluo metilena, le bleu de méthylène.
- *naftolová*, bluo naftola, le bleu naphтол.
- *smaltová*, bluo smalta, le bleu de smalt.
- *Thénardova*, bluo Thénarda, le bleu de Thénard.
- *Turnbullova*, bluo Turnbulla, le bleu de Turnbull.

*Žlut* = flavo, un jaune

- *antimonová*, flavo antimona, le jaune, d'antimoine,
- *chromová*, flavo kroma, le jaune de chrome.
- *indická*, flavo india, le jaune indien.
- *kadmiová*, flavo kadmia, le jaune de cadmium.
- *kasselská*, flavo Kassela, le jaune de Cassel.
- *neapolská*, flavo Napolia, le jaune de Naples.
- *řešetláková*, flavo Avignona, le jaune d'Avignon.
- *strontnatá*, flavo stroncia, le jaune de strontiane.
- *uranová*, flavo urania, le jaune claire.
- *zinková*, flavo zinka, le jaune de zinc.

## GRAVA ĈEĤOSLOVAKA VERKO PRI NATUR-SCIENCA TERMINARO

Gravan intereson de ĉiu, kiu laboras pri internaciaj terminaroj meritas granda verko de profesoro de ĉs. Alta Teknika Lernejo en Praha Emil Votoček: *Ĉeĥa-franca vortaro terminologia kaj frazeologia por kemio, fiziko kaj sciencoj parencaj*. La libro enhavas sur 504 paĝoj kompletajn listojn de teknikaj terminoj kaj parolturnoj ĉeĥaj kaj francaj. La verko tre superas ĉiujn similajn vortarojn per sia atento pri vivanta teknika lingvo kaj per multeco de parolturnoj. Ĝa foliumado estas tre instiga por ĉiu esperantisto verkanta pri natursciencoj, ĉar li sur ĉiu paĝo trovas problemojn tradukindajn. Ni enpresas en ĉi tiu numero esperantajn tradukojn de kelkaj paĝoj el la eminenta libro. S. K.

## INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA.

Tiu ĉi Asocio eldonas nun kvaronjare *Bultenon*, kies januara n-ro 1. aperis. La Bulteno konsistas el kvin partoj: Vivo kun sciigoj pri interna vivo de la Asocio, Agado kun informoj pri agado de la membroj, Progreso kun konstatoj de la progresoj de la aropagando en la sciencaj kaj teknikaj rondoj, dciigoj kun faktoj utilaj por la propagando. Sū interesaj por la membroj, kaj Sekcio pe Teknika Vortaro kun sciigoj interesaj por la kunlaborantoj de tiu ĉi vortaro.

La 1-a n-ro enhavas ankaŭ nomaron de 165 personoj, kiuj estis membroj de ISAE la 1. Novembro 1925.

Prezidanto estas Prof. D-ro Odo Bujwid, prof. de higieno en la universitato de Kraków, Vicprez. Kolonelo Inglada, profesoro de geodezio ĉe la Supera Militista Lernejo de Madrid, Ĝen. sekretario Ing. Rollet de l'Isle, generala hidrografa inĝeniero de la franca maristaro, Sekretario-kasisto S-ro Rousseau, Levallois-Perret (4, Place de la Republique) France (Seine). Komitatanoj estas Prof. Cotton, profesoro ĉe la Pariza Universitato, membro de la Scienca Akademio, Prof. Dietterle, Ing. Isbrücker, D-ro Stromboli.

Nacia delegito por ĈSR estas D-ro Stan Kamaryt, Bratislava, Tělocvičná, 3. En nialando sole 9 personoj estas membroj. Personoj, kiujn la afero rilatas, bv. aliĝi ĉe D-ro Kamaryt, kiu sendos al ili pagilon. Kotizo estas duspeca: Subtenantoj pagas 25 dolarojn (90 Kč), ordinaraĵ 0.5 dolaro (20 Kč).

Sekcio por Teknika vortaro: D-ro Kamaryt proponis sin kiel fakestro por filozofia terminaro. — S-ro Williamson, el Leith (Skotl.) verkis terminaron de kartografio. — S-ro Rollet de l'Isle redaktis komercan vortaron. — Estas starigata teksto de elementoj de

aritmetiko, algebro, analitiko, trigonometrio kaj geometrio. Simila laboro estas entreprenita pri fiziko kaj ĥemio. hm.

## EL ĈEĤOSLOVAKIO

Se iu el tiuj ĉi koncizaj notoj speciale interesas iun el niaj eksterlandaj legantoj, la redakcio povas peri detalan informon.

— Václav Talich, direktanto de la Ĉeĥa Filharmonia Societo, travojaĝis Skotlandon kun la Skota Simfonia Orkestro, direktante kun granda sukceso serion da koncertoj en diversaj urboj.

— Radio en ĈSR. Dum la dua semajno februara estis farita en tuta Ĉeĥoslovakio energia propagando por disvastigo de radiotelefonio. Gazetoj, multaj oficialaj kaj publikaj institucioj kaj privataj fakaj entreprenoj sukcesis vekti inter ĉiuj klasoj de la loĝantaro seriozan intereson. Laŭ la ĝis nun konataj rezultoj oni supozas, ke dum la propaganda semajno la nombro de radio-abonantoj kelkoblis. — La komenco de radio en Ĉeĥoslovakio estis malfacila. Nur en oktobro 1923 estis donitaj la unuaj permesoj por privataj ricevstacioj. Pro malfavoraj leĝoj privata radiotelefonio tiam nur malrapide evoluis kaj en finaj tagoj de la jaro 1924 estis sume nur 1564 radio-amatoroj en la respubliko. De kiam la ŝtato subtenas la disvastigon de radio, la afero iras rapide antaŭen. Ĝis fino de la jaro 1925 anoncis sin 16.000 abonantoj, nun post fino de la Radiosemajno estos da ili proksimume 60.000. — Programo sendata de la moderna 5kilovata stacio en Praha estas unuaranga, el Nacia teatro kaj el ĉefaj koncertejoj estas disaŭdigataj plej valoraj muzikajoj.

— La problemo de la malgrandaj nacioj antaŭ la mondmilito, verko de la ĉeĥoslovaka ministro por eksterlandaj aferoj Beneš, estis tradukita de C. E. Hansen en danan lingvon kaj aperos dum marto en Köbenhavn.

— Internacia skikonkurso por soldatoj okazinta en la montaro Tatry en orienta parto de Ĉeĥoslovakio montris nekutiman lertecon de ĉeĥoslovakaj soldatoj en la skiarto. Ĉeĥoslovakio venkis kun 233.90 punktoj, sekvis Pollando kun 166.70 punktoj, tria estis Francio kun 138.21 punktoj, kvara Rumanio kun 104.82 punktoj kaj kvina Sudslavio kun 90.91 punktoj.

— Printempa foiro en Praha okazos en 1926 inter 21. kaj 28. marto. Krom la kutimaj fakoj, en kiuj estos reprezentitaj ĉiuj branĉoj de ĉeĥoslovakaj industrio kaj komerco, estos en la nuna foiro speciale atentinda la granda ekspozicio de ĉeĥoslovakaj brodaĵoj, fabrikataj ĉefe de la montaranoj en norda Bohemio kaj en Slovakio. La Komerca ĉambro de Cheb (Eger) liveros al la foiro grandan kolekton de tiuspecaj laboraĵoj el sia distrikto. Pluaj nove aranĝitaj fakoj dum la nunjara printempo estos tiuj de higieno, kun riĉaj ekspozicioj de ĉeĥoslovakaj banlokoj, de sporto kaj de radio. Speciala pavilono estis konstruita por pli ol 40 fabrikoj de motocikloj. Vizitanto de la foiro ricevos de la ĉeĥoslovakaj konsuloj senpagan vizon.

— Dro Engliš, la ĉeĥoslovaka ministro de financoj, anoncis ke ĉeĥoslovaka krono restos definitiva monunu de la respubliko. Ĝia valoro restos la ĝisnuna, ĝi ne estos do ŝanĝita por nova mono sur ora bazo, kio okazis en kelkaj eŭropaj ŝtatoj.

## BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333.

NUMERO 8.

FEBRUARO 1926.

Membro de Asocio povas kaj devas esti ĉiu ĉs. esperantisto, por ke li subtenu la propagandon en la tuta respubliko.

Kotizo: Membro aktiva: 16 Kč jare, Membro subtenanta 50 Kč jare, Fonda (Dumviva) 500 Kč unufoje. — La membroj ricevas *senpage Bultenon* kaj, se ili pagas la tutan kotizon per unu fojo, ankaŭ *membran premion*: broŝuro ĉeĥlingva Svaz národů o esperantu (48 paĝoj, vendoprezto 5 Kč). Por la malnovaj membroj, kiuj jam havas tiun ĉi premion, la komitato fiksis alian premion. Plie, *rabato 50%* estas donata al la membroj mendantaj Zkušební řád.

Malpli riĉaj membroj povas pagi la kotizon 16 Kč en kvar partoj po 4 Kč.

Klubaj kasistoj! enkasiginte kluban kotizon, enkasigu ankaŭ la Asocian.

**Radio-amatoroj**, samideanoj havantaj ricev-aparatojn aŭ eblecon aŭskulti radio-disaŭdigojn estas petataj TUJ sendi sian adreson al la redakcio de Progreso.

Klubaj komitatoj. Nun, en la tempo de jarkunvenoj, zorgu, ke via klubo fiksu novan kluban kotizon, en kiu la Asocia kvoto estu jam enhavita. Pluraj kluboj havas kotizon 24 Kč jare, el tio 8 Kč por la klubo, 16 Kč por Asocio.

Membroj de la kluboj. Se en via klubo ne ankoraŭ komuna kotizo ekzistas, aliĝu *vi mem* al Asocio. Se 3 personoj en la klubo pro sia malriĉeco ne povas pagi, kial 30 aliaj, povantaj pagi, ne faras tion, sed diras: Ĉe ni estas senlaboruloj, por kiuj la kotizo estas alta, ktp.

Asocio vin helpos, se vi volas fari propagandan paroladon kaj ne havas tekston por ĝi, nek propagandajn flugfoliojn.

Asocio vin helpos, se vi volas aranĝi propagandan ekspozicion kaj ne havas materialon por tio.

Asocio vin helpos, se vi volas fondi klubon, kaj ne scias formalajojn, nek havas ideon pri verkado de statutoj ktp.

Adreso de Asocio por viaj aliĝoj, petoj, proponoj, informoj estas: ĈAE, Praha-VII. Sochařská 333.

### III. KONGRESO EN BRATISLAVA

la 1.—2. Majo 1926.

Aliĝiloj estas almetitaj al tiu ĉi n-ro de la Progreso. Se vi bezonas pliajn, skribu al L. K. K., S-ro H. Kesik, Bratislava, Radnica 93/a.

Programo de la kongreso troviĝas sur la aliĝiloj. Ĝi diferencas de tiu presita en la lasta bulteno jene: Sabate la 1. V. posttgm. ne estas kinoprezentado, sed je la 14.30 teatra prezentado, je la 17. promonado tra la urbo, je la 19. labora kunsido, je la 21. komuna vespermanĝo kun amuza programo.

Dimanĉe matene je la 9a estas tria kunsido, je la 10.30 alveno de la karavano de Wienaj esperantistoj, posttagmeze ekskursoj.

Favoraj prezoj en Bratislava estas troveblaj sur la dorsa flanko de la aliĝilo. Atentu ilin!

Fervoja rabato de 25% estas atendebla. Necesajn detalojn poste sciigos al la aliĝintoj la LKK.

Teatra prezentado promesas esti tre interesa. Oni intencas ludi tri unuaktaĵojn. La aktoroj apartenas al 5 urboj kaj lingvoj.

Aliĝu tuj, por faciligi la preparojn de LKK.

**RUD. HROMADA:**

### ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO EN 1925

(Laŭ la raporto prezentita al la ĝenerala kunveno de ĈAE, la 28. Februaro 1926, kaj tie per ĉiuj voĉoj akceptita.)

La komitato elektita en la ĝenerala kunveno la 22. Marto 1925 konstituigis jene: Prezidanto: S-ro J. Eiselt, Vicprezidanto: D-ro St. Kamaryt — Bratislava, Ĝenerala Sekretario: R. Hromada, Sekretario: S-ro O. Ginz, Kasisto Fr. Novák, la ceteraj komitatanoj restis sen specialaj funkcioj. Dum la daŭro de la jaro, pro privataj kaŭzoj rezignis S-ro Ginz kaj membroj de Kontrola Komisiono K. Procházka kaj Hanzelka-Orlová. La komitato kunvenis okfoje.

Membroj. La membrolibro de ĈAE enhavas 2049 monojn, t. e. personoj, kiuj

depost 1920 aliĝis al ĈAE. Grandaparte ili estas rigardataj kiel ekzistintoj kaj kiel membron ni kalkulas sole tiun, kiu pagis en 1925 plenan kotizon 16 Kč aŭ, se li aliĝis en la fino de la jaro, la laŭtempan ekvivalenton. Tiel kalkulate, ĈAE havis 482 membrojn aktivajn, 4 subtenantajn (po 50 Kč) kaj 3 fondajn, dumvivajn (po 500 Kč unufoje por ĉiam). Plenan kotizon 16 Kč el 482 pagis 436, po 12 Kč pagis 3, po 8 Kč 30, po 6 Kč 2, po 4 Kč 11 membroj.

Dumvivaj membroj estas S-roj: Ing. Janěčka, ministeria konsilanto Mil. Schmidt kaj komercisto M. Weisskopf, ĉiuj en Praha.

Subtenantaj membroj estis en 1925 S roj Ginz, R. Hromada, Fr. Novák, kaj etika organizado Obec Nového Lidu. Tiu ĉi kategorio estis kreita dum 1925 precipe por ebligi, ke neesperantistoj, amikaj al la ideo de esperanto, havu eblecon finance subteni ĈAE. Tion bv. atenti niaj membroj en 1926.

Inter la 486 membroj estas 121 novaj, kaj ĉar en 1924 estis 703 membroj, montriĝas malkresko 217 kaŭzita per tio, ke ĉefe la personoj pagintaj en 1924 malgrandan neplenan kotizon, ofte nur 1—3 Kč, ne plu repagis kaj estis forstrekitaj. Tamen la sumo de la kotizoj ne malkreskis en 1925, male ĝi plialtiĝis je 700 Kč, estante 7391 Kč plus 1500 Kč (dumvivaj membroj) kompare kun 1924: 6718.—. En sv. frankoj: 1924: 1010, en 1925: 1110 plus 225.

La 486 membroj troviĝas en 114 lokoj: Praha: Klubo 115, Rondeto 4, Ústí n. Orl. 47, Slezská Ostrava 32, Červený Kostelec 30, Hradec Králové 29, Jablonné n. O. 21, Jaroměř 17, Orlová 11, Brno 7, Nymburk 7, Nové Zámky, Vyškov, Budějovice po 6, Holešov, Plzeň po 5, Pardubice, Olomouc, Bratislava, Choceň po 4, Opava, Bystřice pod H. po 3, Jičín, Košice, Písek, Soběslav, Turnov, Vrútky, Lipník, Pelhřimov po 2, plie 83 lokoj po 1 membro.

En tiuj ĉi ciferoj ne troviĝas la nove fondita Klubo Kolín kun 12 membroj pagintaj po 3 Kč por la lastaj 3 monatoj 1925.

La nombro 486 membroj do estas eĉ ne duono de la sumo 1000 membroj, kiun ni esperis atingi, kaj sur kiu bazis la budĝeto Asocia, aprobita de la lasta jarkunveno kaj difinanta tendencojn kaj amplekson de nia agado.

Estas interese observi, ke pli volonte pagas la kotizon novaj membroj, dum ke multaj malnovaj, memorantaj la tempon, kiam ili kotizis sole per 2 Kč, nomas ĝin neto-

lerebla. Tion ni opinias preteksto, kiun la nepagantoj uzas por kovri sian nekapablecon gvidi esperantan klubon aŭ por kovri sian neinklino por pli vigla laboro por-esperanta. Ĉie, kie klubo efektive vivas, propagandas kaj sekve sentas bezonon de helpo flanke de Asocio, tie la kotizoj estas pagataj. Sed kie la agado de klubo estas minimuma, tie kompreneble oni ne sentas la bezonon de Asociaj propagandiloj, flugfolioj, paroladoj, ekspozicia materialo, konsiloj ktp., kaj sekve, ne sentas ankaŭ la bezonon de forta centra organizado. Ni estas konvinkitaj, ke por varbado de membroj en ĉiu klubo sufiĉas unu persono, ekz. la konsciencia agema kasisto, tiom pli ke en 1925 la M ricevadis senpagan premion (ĉehlingvan broŝuron Ligo de Nacioj pri esperanto, 48 p., vendoprezo 5 Kč) kaj Bultenon, kiu informis ilin pri la laborado de Asocio.

Tiu ĉipremio estas donata en 1926 al novaj membroj, por la malnovaj, jam havantaj ĝin, la komitato fiksis 1—2 novajn premiojn.

Por paroli pri „izoluloj“, t. e. membroj en la senklubaj lokoj, ilia cifero estis 90, ricevebla, se oni substrahas de la cifero de 114 lokoj kun membroj la sumon 24 lokoj, kie estas kluboj. Nia klopodo altiri tiujn ĉi izolitajn esperantistojn al la Asocio ne trovis la deziritan sukceson. Certan tagon ni ekz. dissendis 235 varbilojn kaj gajnis sole 25 membrojn, do ne plenajn 11%. Sur tiu ĉi kampo, Asocio sentas konkuron de UEA. Tiu ĉi organizado internacia, pri kies neceso kaj subtenindeco mi, kiel ĝia aktiva komitatano, certe ne bezonas prezenti kredodeklaron, akceptas ja grandan kotizon 50 Kč, sed redonas ĝin preskaŭ plene per valoro de tio, kion ĝia membro ricevas: la gazeto kaj la Jarlibro. Ĉs. Asocio akceptas ja sole 16 Kč, kaj ankaŭ ja redonas parton de la kotizo en formo de la broŝuro kaj Bulteno. Sed tiujn ĉi kapablas taksati sole tre agema esperantisto, propagandisto; nur tiu en ili vidas valoran helpilon. Sed, ĉefa afero, la granda parto de la kotizo restas en Asocio; devas en ĝi resti kaj ne povas esti redonita, ĉar ĝi devas servi al la bezonoj de la movado en la tuta lando. La membro do ne sentas personan utilon de sia membreco en ĈAE. Estas eĉ inter la esperantistoj malmulte da personoj, kapablaj kontentiĝi kun la konscio, ke ili — subtenante la tuton — subtenas ankaŭ sian, sian idealon, objekton de sia celado. Ni

ne trovis la atendatan milon da tiaj personoj, sed almenaŭ ni trovis preskaŭ kvincentojn da ili. Ni eldiru al ili nian esperantan dankon, ĉar ili estas tiuj, sur kiuj staras nia Asocio kaj, per ĝi, la progreso de nia movado en ĈSR.

La nova komitato certe salutus ĝoje, se la Jarkunveno trovus vojon, kiel plialtigi la nombron de la Asocioj. Ankaŭ en 1925 aŭdiĝis la proponoj, ke la membroj pagu iom pli kaj ricevadu senpage la gazeton Progreso. Ni studis la aferon, sed ĝi montriĝis malfacile solvebla jam nun, ĉar sole 200 M de ĈAE ne abonas, aliflanke 600 abonantoj ne estas membroj de ĈAE, kaj la gazeto ne estas ankoraŭ sufiĉe forta por porti la necesan perdon.

La plej bona vojo por trovi, kiel la proponata aranĝo aspektus, estus: enketi inter la kluboj, kiom da iliaj membroj aliĝus, se ili ricevus membrecon (kun premioj) kaj la gazeton anstataŭ por la nunaj 36 Kĉ, por sumo ekz. 30 Kĉ. Estas demando, ĉu la ŝparo de 6 Kĉ decidus, kaj plie, en kiu proporcio tiu ĉi perdo estu dividita inter ĈAE kaj Progreso.

Inter ĉi tiujn pripensojn apartenas ankaŭ la sugesto de S-ro H. Jakob, Direktoro de UEA, kiu en la januara n-ro de Esperanto aludas, ĉu la ĝisnuna sistemo, dum kiu esperantisto kotizas al tri flankoj, povus esti simpligita tiel, ke per unu sumo ĉiu pagus la UEA-kotizon, la ĈAE-kotizon kaj Progreso-abonon (resp. GEL kaj Marto-kotizojn, ĉe la germanaj samideanoj en ĈSR.) La suma kotizo estus kompreneble malpli alta, kaj pagata al UEA-delegito, kiu sendus ĝin al la Ĉefdelegito, kaj tiu transdonus la kvoton de Asocio kaj de Progreso. Tiu stato estus ideala, sed por realigi ĝin estus necese ke 1. sukcesu la supre menciita plano pri unu kotizo por ĈAE kun Progreso, 2. ke S-ro Sklenčka loĝu en Praha kaj 3. ĉefe, ke li havu plian helpanton, ĉar lia jama laboro plene elĉerpas lian liberan tempon.

Kun S-ro Sklenčka mi komparis la adresarojn de UEA, ĈAE, kaj Progreso, kaj ni konstatis, ke en 1925 estis en ĈSR 189 ĉeĥaj esperantistoj, ni diru 100procentaj, t. e. pagantaj al ĉiuj ĉi tri entreprenoj.

**Kluboj.** La sistemo de la regula monata raportado de la kluboj al ĈAE iom post iom fariĝas regula. La rezultoj estas publikataj en Bulteno kaj Progreso, kies koncerna rubriko estas redaktata klare kaj supervide, sen superflua balasto de vortoj. Be-

daŭrinde la eksterlandaj gazetoj ne ĉerpas el ĝi kaj montriĝas la neceso, sendadi almenaŭ al Esperanto, kaj Heroldo apartajn informojn pri la movado en ĈSR. Notinde revigliĝis la agado de la kluboj en *Sl. Ostrava* kaj *Choceň*, nova klubo fondiĝis en *Kolín*, preparoj por fondo estas farataj en *Pisek*, *Pelhřimov* kaj *Luže*. Speciale vigle laboris la klubo en *Ústí n. O.* Sen sukceso restis la klopodo revivigi la klubojn en *Domážlice*, *Kladno* kaj *Hranice*. El la slovakiaj kluboj vigle rilatis kun ni E. K. *Nové Zámky*, el la moraviaj E. K. *Přerov*, el la sileziaj *Sl. Ostrava*, la orientbohemiaj ĉiĉj. La rilatoj kun okcidenta klubo *Plzeň* estis minimumaj. Spite multa kaj diversflanka korespondado ni ne sukcesis konstati, ĉu klubo ekzistas en *Klatov* aŭ ne. En la norda Bohemio, klubo de ĉeĥaj esperantistoj en *Liberec* sukcesas en la gazetara servo. En la suda Bohemio fondiĝis klubo en *Týn n. Vlt.*; en *Budějovice*, spite la klopodoj de generalo Rambousek, prez. de tiea klubo, sole 6 membroj aliĝis al ĈAE.

**Regionaj kunvenoj.** Dum 1925, laŭ la deziroj de la komitato mi partoprenis la regionajn kunvenojn en Přerov, Plzeň, Kutná Hora, Holešov. Ne estis do plene sekvata la decido, siatempe farita de ĈAE, ke al ĉiu reg. kunveno delegito estu sendita. Tiel mankis delegito en du kunvenoj okcidentbohemiaj kaj en Jilemnice; de tie ĉi ĈAE tial ricevis akran proteston. La kaŭzo, ke ie mankis delegito de ĈAE estis, ke per tiu ĉi funkcio ĉiam estis komisiata la ĝen. sekretario, kiel funkciulo plej detale informita, kaj mi, pro diversaj kaŭzoj privataj, ne ĉiam povis akcepti. Por la slovakia reg. kunveno en Nové Zámky estis delegita D-ro Kamařyt. La kostoj de la delegado al la nomitaj kunvenoj estis 914 Kĉ. Estas ĉiama opinio de la komitato, ke estas necese, ke iu gvidanta funkciulo de ĈAE estu en *personaj* rilatoj kun la membraro, donadu al ili informojn kaj traktu kun ili farotajojn, el kiuj multajn oni ne povas antaŭtempe publikigi kaj ke li dum sia persona ĉeesto aŭdu la dezirojn de la membroj, iliajn opiniojn pri diversaj demandoj ktp.

**Regiona organizo.** En 1924 E. K. Ústí n. O. proponis, ke estu starigitaj regionaj organizadoj. En 1925 S-ro Pitlik proponis la samon, subtenata de Klubo Ústí. La lasta jarkunveno transdonis la proponon al la komitato, kiu faris en la Bulteno, n-ro 5 aperinta en septembro, alvokon al ĉiuj ĉs.

esperantistoj, ke ili sendu siajn opiniojn kaj proponojn, rilatantajn al tiu ĉi ideo. Nenio venis al ĈAE, sole E. K. Ústí atentigis pri sia propono el 1924. Tiu ĉi fakto ne surprizas tiun, kiu vidas, ke eĉ la unua ŝtupo de regiona organizo, la kunvenoj laŭ la modelo de la orientbohemiaj, ne ĉie atingis sukceson, kaj ekz. en la centra kaj la suda Bohemio tiaj kunvenoj tute ne povis okazi pro manko de personoj emaj zorgi pri ilia kunvenigo, cetere sufiĉe simpla, ĉar adresaroj de ĈAE, UEA kaj Progreso estis al disponeblaj. Pri la afero la nova komitato ree okupiĝos, ĉar S-ro Pitlik prezentas al tiu ĉi jarkunveno denovan proponon pri ĝi.

*La III. ĉs. kongreso*, komence projektata por 28—29 Julio 1925, poste por la pentekosto 23—24 Majo 1925 en Trenčianské Teplice, estis prokrastita, sekve de nesufiĉa intereso precipe en Slovakio kaj sekve de aliaj teknikaj malfacilaĵoj, pri kiuj ni informis dum la jaro. Ĝi okazos la 1—2 Majo 1926 en Bratislava kaj la loka komitato jam vigle eklaboris. Laŭ la interkonsento siatempe farita inter ĈAE kaj GEL, la kongresoj okazas alterne en ĉeĥa kaj germana lingva regiono. La loko, dato kaj ĉiuj principaj demandoj estas interkonsentataj inter ĉiuj tri organizaj centroj en nia respubliko: ĈAE (Ĉeĥoslovaka Asocio Esp.), GEL (Germana Esperanto-Ligo) kaj LLE (Laborista Ligo Esp.). Tiun ĉi jaron ĈAE havas devon prepari la programon de la laboraj kunsidoj. Ni do publikigis en la Bulteno, n-ro 7 (januara) la inviton al ĉiuj ĉs. esperantistoj, kun la peto, ke ĉiujn proponojn por la laboraj kunsidoj ili sendu al ĈAE ĝis 27. Februaro. En tiu limtempo sole Ĉefdelegito de UEA, S-ro Sklenčka, anoncis raporton pri UEA-Teritorio Ĉeĥoslovakio. Detalaj informoj pri kotizo, programo, fervoja rabato. prezoj troviĝas sur la aliĝilo, baldaŭ aperonta.

*Sumigado de esperantistoj en ĈSR.* Ĝis nun estas neeble starigi la sumon de ĉs. esperantistoj, kvankam ofte ni bezonas tiun ĉi ciferon, kiom eble plej precizan. Ĝia bazo estos la materialo troviĝanta en la adresaroj de ĈAE, GEL, LLE kaj UEA, Progreso kaj Marto, Fervoja, Poŝtista kaj aliaj fakaj organizoj esp. Tamen, ĉiam montriĝas novaj kaj novaj esperantistoj, tute ne konataj al ni. Por proksimiĝi kiel eble plej precize al la vera cifero, ni ofte publikadis peton, ke el ĉiu loko oni sendu al ni nomaron de esp-istoj, organizitaj ie ajn, aŭ tute ne. Tio okazis nur parte, tial daŭrigo en 1926 estas necesa. (Daŭrigo)

## KRONIKO EL ĈEĤOSLOVAKIO

Laŭ informoj ricevataj de Ĉs. Asocio Esp.

### DUON-OFCIALA INSTRUADO

**Stupava** ap. Bratislava. Laŭ permeso de la direktoro, S-ro R. Bartal, pastro, gvidas kurson por lernantoj de la burĝa lernejo.

### NOVAJ KURSOJ

**Praha.** En kursoj de E. K. Praha S-ro Koutek instruas 18 komencantojn; S-ro Gimz gvidas kurson por 11 progresintoj.

En la Privata lernejo de Ĉs. Instituto S-ro Eiselt instruas 6 p., S-ro Pitlik 10 p.

**Kolln.** Kurson por 15 p. gvidis S-ro Ĉerný.

**Wien.** Bohema klubo esperantista aranĝis kurson, en klubejo, Národní dům, Wien XV.

### FERVOJISTA KURSO

**Doubrava (Silezio).** Fervoja inspektoro, S-ro Aug. Peterka, staciestro en Doubrava, iniciatis kurson por 15 fervojistoj, kiu komencis en Januaro, en ejo de la nomita stacidomo. Gvidas S-ro Hanzelka.

### ĜENDARMA KURSO

En Praha, laŭ permeso de la Landa ĝendarmkomandejo, S-ro Vávrovský, ĉefserĝento, instruas 26 p. kiuj vizitas la ĝendarman lernejon.

### PUBLIKAJ PAROLADOJ

En Nový Hradec Králové profesoro M. Lukáš parolis la 14./2. pri esp. Al la kursoj aliĝis 100 p., la urbestro solene malfieris la kurson en la nomo de loka Kultura Komisiono.

En Most S-ro Krisl, instruisto, parolis la 18./2. pri lingvo internacia, en la prelegaro de „Laborista lernejo“.

### LOKAJ RAPORTOJ

**Ĉs. Katolika Esperanto-Unuiĝo** en Praha kunvenas regule la duan kaj kvaran jaŭdon de ĉiu monato en Abstinanta Restoracio, Praha-II., Ostrovní 18. Meznombre partoprenas 10 membroj, esp. konversacion gvidas F-rino Dandová. — La Unuiĝo publikigas en ĉeĥaj gazetoj katolikaj informojn pri esp. — Ĝia membro, S-ro Benetka el Jičín publikigis artikolon: Esperanto ligilo de la ideo de katolikismo, en kolekto de prelegoj por katolikaj organizoj (Sbírka přednášek pro katol. spolky a organizace, N-ro 9). Adreso: Praha-II. Spálená 80.

**Pelhřimov.** La kurso aranĝita de la loka Kultura Komisiono daŭris de 19/11 ĝis 29/1, po 2 horoj semajne, sume 16 horoj. Instruis Del. de UEA, S-ro Volf, al kiu esperante dankis liaj lernantoj. Al la fondata klubo aliĝis 15 p. Ĉiujn esperantistojn el ĉirkaŭaĵo ni petas, ke ili anoncu siajn adresojn al S-ro Jindřich Kautský, vrch. berní správce v. v., Pelhřimov.

**Hradec Králové.** Dum la ĝen. kunveno okazinta la 20. Januaro, la jena komitato estis elektita: Prez.: Fr. Šnejberk, blinda samideano; Vicprez.: Prof. M. Lukáš; Sekr.: O. Sklenčka; Kas.: Vil. Černý; Bibl.: S-ino Sklenčková; Protokol.: F-ino M. Dolanská; Arkiv.: Jarka Dolanský; K. Juna kaj prof. Fr. Smeták, Revizoroj Křourek kaj Kostka.



## ESPERANTISTA MOVADO

### PASKA KUNVENO EN LOCARNO

ĈAE ĵus ricevis inviton al la kunsidoj en Locarno, kie de la 3. ĝis la 6. Aprilo kunvenos la Internacia Centra Komitato kun reprezentantoj de la Naciaj Societoj, de la fakaj organizaĵoj, kaj kun komitatanoj kaj Ĉefdelegitoj de UEA.

Dro Privat skribas en la invita letero:

„Tiu ĉi jaron ICK decidis ne kunvoki iun Teknikan konferencon, ĉar plimulto opiniis, ke nia movado kreskas pli rapide ol niaj internaj fortoj, kaj tial ni antaŭ ĉio egaligu ambaŭ ritmojn per pli metoda koncentrado. Sed montriĝas sufiĉe grava la manko je interkongresa renkontiĝo de niaj ĉefaj organizaĵoj. Ĉiuj estas tre okupataj, malmultaj trovas tempon por korespondadi, tro multe eĉ tute ne respondas surĝajn demandojn. Buŝa interparolado pli kaj pli necesiĝas.“

Aliflanke en niaj someraj kongresoj estas malfacile trovi kvietajn momentojn por kunsidi. Ankaŭ la organizaĵaj problemoj ĝis nun formaniĝis tro grandan parton de niaj kunsidoj.

„La nuna ICK celis ilin finsolvi kaj flankenlasi por doni la unuan lokon al pli gravaj kaj urĝaj propagandaj aferoj. En tiu kampo ni bezonas pli da regula kunlaborado kaj ĉefe pli bona preparado per akurata dokumentaro kaj statistiko.“

„ICK bez nas scii kion la Naciaj Societoj kaj UEA estas pretaj entrepreni aŭ partopreni. Ankaŭ du anoj de ICK kaj estraro de KR devas esti reballotataj. Fine du naciaj societoj proponis ŝanĝon de regularo.“

La kunsidoj malfermiĝos sabaton vespere 3. Aprilo je la 17a en la salono, kie subskribiĝis la packontrakto inter Germanujo kaj la okcidentaj potencoj, ili daŭros ĝis mardo vespere, kaj K. R. havos apartan kunvenon internan je tiu tago.“

Sekve de siaj spertoj akiritaj en certa afero ĝuste en la ĵus pasintaj monatoj, Ĉeĥoslovaka Asocio havas gravajn motivojn deziri plenan sukceson al tiuj ĉi kunsidoj kaj helpi ĉiurilate, ke tiu sukceso estu atingita.

\*

(La XVIII. kongreso en Edinburgo), okazonta de 31. Julio ĝis 7. Aŭgusto, estas zorge preparata. Aliĝiloj estis disdonitaj per januaraj aŭ februaraj n-roj de esp. gazetoj. Nericevintoj povas peti ilin de ĈAE. Kongresa kotizo estas 1 funto sterlinga (cca 160 Kč), do sufiĉe alta, sed espereble neludonta gravan rolon en la tuta budĝeto de kongresontoj. Sendebila en angla mono per registrita letero al J. M. Warden, 18. Kongreso Esperantista, Edinburgh (sufiĉas). Blinduloj ne pagas kotizon. Senpage por ĉiuj kongresanoj estos la prelegoj de Somera Universitato: Ĝis nun anoncitaj: Folkloro kaj Popolaj kantoj (Prof. Cart, Benneman, Kornfeld, Ĉe, D-ro Olsvanger). Lingvistiko (Prof. Collinson, Medicino (D-ro Bujwid-Kraków, D-ro Deuel-Leipzig) k. a., inter ili kelkaj kun lumbildoj.

Protokantoj de la kongreso estas Duko de Connaught, urbestroj de Edinburgo kaj aliaj urboj, famaj edukistoj, Parlamentanoj ktp.

Ĝis nun estas anoncataj la jenaj aranĝoj kongresaj: diversaj koncertoj, senpage por kongresanoj (en tio: tutvespera koncerto de la fama horo Glasgow Orpheus Choir), balo, jaŭde tuttaga ekskurso al belegaj fjordoj apud rivero Clyde. La LKK bedaŭras, ke estas neeble lui teatron.

Fervojarabato: Revenbiletoj el ĉiuj Britaj stacioj kaj havenoj al Edinburgo, po 1 $\frac{1}{3}$  de la ordinara unuvoja kosto. Detaloj pri aranĝoj loĝeal aperos venonte. Laŭ la 2-a n-ro de la Bulteno ĝis 31. Januaro aliĝis 176 p. inter ili: 76 Skotoj, 71 Angloj, 17 Germanoj, 4 Francoj, 3 Poloj, 2 Nederlandanoj, po 1 Aŭstro, Kimro, Italo, Svisoj kaj Ĉeĥoslovakoj (S-ro Julius Procházka, instruisto, en Odrlice ap. Litovel, Moravio).

En nia januara n-ro ni publikigis informon pri karavano projektita de D-ro Renken el Bremen. LKK informas nin, ke estas erara la aserto de D-ro R., ke pensiono en Edinburgo por la kongressemajno kostos minimume 165 RM (1300 Kč). LKK skribas: „Se tio ja estus vera, LKK ne entreprenus sian taskon organizi kongreson. Sed la aserto estas ne vera. Se iu kongresonto posedas tro da mono kaj speciale deziras tiel elspezi ĝin, ni faros nian eblon por kontentigi lin, loĝigante lin en luksega hotelo! Sed por la ordinara kongresano eĉ la maksimuma kosto por la semajno ne atingos la sumon 1300 Kč, kaj la plej malkara kosto laŭ niaj aranĝoj estos kredeble nur kvinono de tiu prezo. Skribu rekte al LKK Edinburgo kaj vi baldaŭ ricevos mendilon kun ĉiuj prezoj.“

Tio estas informo tre interesa, kiu certe plezurigos multajn, ĉar oni do povos kontentige vivi kaj loĝi por sumo ekz. jam 50 Kč tage.

LKK farus utilan servon al ĉiuj, se ĝi publikigus ankaŭ informojn, kiom kostas ŝipo al diversaj havenoj kaj fervojoj de tiuj ĉi al Edinburgo, precipe ankaŭ de suda Anglio tra Londono al Skotlando.

Aliflanke, The Esperanto Institute Ltd., Welwyn Garden City, Herts., ĵus fondita de S-ro Edmonds, Wadham k. a., informas pri karavanoj de Londono, tra diversaj anglaj urboj al Edinburgo, kaj reen tra aliaj urboj al Londono. Unu karavano trapasos belan kamaron kaj historiajn lokojn, aliagravajn industriaĵajn centrojn kaj havenojn, vizitos fabrikojn k. s. La vojaĝo daŭros 14 tagojn kaj kostos 14-14 funtojn (2.400 Kč). En tiu sumo estas veturado, loĝado survoje kaj dum 8 noktoj en Edinburgo, transporto de pakaĵoj, servoj de gvidistoj kaj interpretistoj, trinkomonoj. Manĝo ne estas do enkalkulita.

(Zamenhofa Monumento) estas oficiale inaŭgurata en 1927, post Danziga kongreso, ĉar tiam impona reprezentantaro de la tutmonda esperantistaro povos partopreni. Sed dumtempe Polaj samideanoj opinias dezirinda okazigi solenan inaŭguron de la monumento la 14. Aprilo 1926, en la datrevena tago de la morto de Zamenhof. Organiza komitato de ZM petas, ke oni helpu ĉiumaniere: 1) Tiuj kiuj loĝas proksime al Varsovio, veturu tien por la 14. Aprilo 1926, 2) Naciaj Societoj aŭ aliaj gravaj organizaĵoj elektu reprezentanton el tiuj, kiuj povas ĉeesti, kiu parolu en via nomo, 3) Sendu telegramojn aŭ leterojn al la Prez. de la loka por-monumenta Komitato D-ro W. Robin, Marszalkowska 113, Warszawa, 4) Tiuj, kiuj ne ankoraŭ donacis ion por la monumento, faru tion nun, tiom pli ke laŭ la decido de la Geneva kongreso la monokolekto estas daŭrigata, por alia memora celo.

## LINGVA FAKO

Pokračujeme v tomto čísle v uveřejňování textů k překladu. Kruh překladatelů těchto textů jest již dosti značný a na mnohých z nich je viděti dobrý účinek této rubriky. Žádáme je, aby v překládání pokračovali a nám svoje práce zasílali. Očekáváme ovšem, že se v tomto roce zúčastní i mnoho jiných čtenářů.

Upozorňujeme znovu, že z rubriky této těžiti mohou naše kluby. V klubovní schůzi se text diktuje těm, kteří Progreso ještě neodbírají a určí se, že každý člen svůj překlad přinese do schůze, buď za týden, nebo za 14 dní. V té schůzi pak předsedající čte první větu originálu. Jeho levý soused čte svůj překlad této věty. Po té na dotaz předsedajícího přihlásí se ti, kteří mají překlad odlišný. Nastává velmi užitečná výměna názorů, proč ten neb onen překlad slova nebo obratu, je lepší. Výsledek této debaty o první větě se poznamená jako definitivní překlad. Na to čte se druhá věta, jejíž překlad dle své práce oznámí další člen, opět následuje dotaz po odlišných překladech a tak se věc opakuje, až celý článek je přečten, překlady prodebatovány a sestaven překlad, který jest shledán za nejlepší; ten zašle se Progresu.

Upozorňujeme však, že často jsou možny dva i tři odlišné překlady některého slova nebo obratu, dle toho, jak kdo příslušné místo originálu pojímá, takže vedoucí těchto „tradukaj rondoj“ má býti co možná liberální.

Po vytištění vzorného překladu v Progresu si členové klubu překlad ten na jiné schůzi porovnají se svým překladem. Mají-li jakékoliv poznámky, nechť je sdělí redakci, která jim odpoví buď dopisem (přiložte známku 1 Kč), nebo v této rubrice.

## 14. TEXT K PŘEKLADU

**Romantikové techniky.** Lidské radosti a žalosti se nemění, a to, co se na nich mění, je pouze forma, kterou se projevují. Na generace předcházející se díváme asi tak jako oktáván na primána. Vždyť to byli takoví nepraktičtí romantikové ti potulní rytíři a pěvci, náboženští horlivci a vlastenečtí písmákové, máchovští probuzenci a snilkové hudby a veršů — lidé nepraktičtí, kteří věnovali kus života, část hmotných prostředků a práci na účel, který jim nepřinesl žádný úměrný užitek. Dnešní lidé zdají se býti jinými. Jsou to lidé, kteří mají radost z technické činnosti. Fotografický přístroj nahrazuje paletu, radio hudební nástroje, motocykl cestování pěšky. Lidská touha po radosti projevuje se dnes jinou formou než před padesáti nebo sto lety. Avšak i dnešní generace je romantická. Sestavuje-li někdo jako amatér již čtvrtý nebo pátý radiový přijímač a překonává-li za pomoci motoru terenní nebo vzdušné překážky — nemá k tomu zapotřebí také tolik romantického nadšení, jako když některý jeho předek psal oslavnou ódu? A zdaří-li se mu jeho práce, má z ní také radost a nelituje obětovaného času, námahy a peněz, ačkoliv jediným užtkem jest mu mnohdy jen radost z práce. I nynější generace je romantickou. Dnešní lidé jsou však — romantikové techniky.

St. K.

## BIBLIOGRAFIO

## KVIN NOVAJ LIBROJ ESPERANTAJ ELDONITAJ EN ĈSR.

En la unuaj tagoj de 1926 aperis sur la libra ĉs. merkato kvin libroj, el kiuj tri estas lerniloj, unu beletristika traduko kaj la kvina estas verko apartenanta en la sferon de pedagogio.

La unua el ili estas la tria eldono de la konata lernolibro de la senlaca pioniro de nia movado F-ino Julie Šupichová: Esperanto. Mlunvice, výbor článků a slovník esperantsko-český, Por memlernantoj kaj kursoj. Eldonis Solc & Šimáček, Praha.

La fakto, ke tiu ĉi lernolibro aperas jam la trian fojon, kvankam tri aliaj lernolibroj krom tio estas vendataj, atestas, ke la libro trovis plaĉon ĉe la personoj, kiuj ekintencis lerni esperanton. Kvankam multaj kursestroj dezirus havi pli da ekzerca materialo en ĝi — kion cetere ne permesas la amplekso de la libro, havanta ne pli ol 120 paĝojn, formato 11×18 cm — tamen la libro multe estas uzata ankaŭ en la kursoj.

Tre interesaj estas tradukoj de ĉeĥaj multsignifaj vortoj, ekz. míti. Tamen tie ĉi ni ŝatus vidi konsilon, ke la verbo „míti“ en la frazoj, kie ĝi signifas devon, estu ankaŭ tradukita per „devi“. Mámé pilně pracovatí: Ni devas diligente labori.

La lernolibro estas konvene kompletigita per malgranda legolibreto kun 12 interesaj tekstoj, kaj per 16 paĝa vortareto esperanto-ĉeĥa, kun vortoj enhavitaj en la tekstoj.

La dua libro prezentas al la ĉs. samideanoj ion, kio mankis al ili depost disvendo de la broŝureto de L. Pilný: Rozmluvy ĉesko-esperantské kaj de Štěpánek: 1000 vět konversace. Ĝi estas *Kniha ĉesko-esperantské konversace* ankaŭ de Jul. Šupichová, eldonita en la sama eldonejo. Sur 118 paĝoj troviĝas 1318 frazoj, sur maldekstra paĝo ĉeĥaj, sur la dekstra esperantaj, pri socio, vojaĝado, loĝigo, transportiloj, sportoj, amuzoj ktp.

Jen tre bona libro, kiu povas doni grandan utilon al niaj ĉs. samideanoj, precipe al la multaj izoluloj, kiuj ne havas eblecon ekzerca konversacion en iu klubo. Kaj ni ne tmas diri, ke ankaŭ multaj klubanoj devas tuj aĉeti la libron kaj zorge ĝin studi. Ili konatiĝos kun multaj praktikaj vortoj kaj lertaj parolturnoj, evitos sklavan tradukadon el sia gepatra lingvo, kaj veninte inter esperantistojn, ili ne silentos esperante nek babilos ĉeĥe, sed ili tie ĝoje konstatos, ke ilia penso facile venigas la ĝustajn esp. vortojn sur la lipojn.

Jen kelkaj rimarkoj, kiuj neniel malgrandigas la valoron de la bela libro. En frazo 176 la esprimo „doganejo“ (celni úřad) estus pli preciza ol „impostejo“. En frazoj „Kiom da vi postulas monate“ la vorto „da“ ŝajnas al ni superflua (187, 308, 352). „Kup si jízdní lístek do Popradu“ ni preferus traduki „bileto al Poprad“, ĉar „en Poprad“ oni komprenus „v Popradu“. En 281, 1158, anstataŭ „ĝis“ ni preferus „kiam“. En 420 anstataŭ „tamen“ ni dirus „ja“, ĉar „tamen“ kun sia signifo „nimeně“ donas al la frazo alian sencon. Motoro haltas (ne haltigas, 446), prunoj aperos (ne aperigos, 1017). En 708 krom „Ĉu mi estas ankorau vizitonta vin? (kuraciston)“ konvenus diri: „Ĉu mi devas ankoraŭ viziti vin? aŭ „Ĉu mi ankoraŭ vi-

zitu vin?" Internacia senco de „biografo“ estas alia ol en 892 (pliĝuste „kinematografo“, „kino“). „Abonigu gazeton“ ni komprenas „dejte si předplatiti“, en 946 ni dirus simple „abonu“. „Kariofilo“ signifas kořeni hřebíček, sed karafiát estas „dianto“. Por „kolínská voda“ pli uzata estas „akvo kolonja“ ol „odekolono“ (1126). En 1141 pli ĝusta estus „tion“ anst. „ĝin“. En 1167 „ĝuste“ anst. „ĵus“. En 1099 anst. „glaso de horloĝo“ certe apartenas „vitro“. Ĉu en 349, 443, 587, 878, 1027, 1229 la artikolo „la“ konvenas? Male, ni ĝin metus en 774 La banloka domo, en 783 La pasintan jaron.

Tiuj ĉi rimarkoj, kiujn ni kuraĝas fari, neniel malgrandigas nian sinceran konvinkon, ke la tre ŝatata aŭtorino faris grandan servon al ni ĵ. ĉs. adeptoj. Tia libro estis jam longe dezirata kaj ni ne dubas, ke la unua eldono baldaŭ disvendigos, tiom pli ke la prezo estas modera; (9.60) eble la firmo presigos la duan eldonon sur pli bona papero.

La *trian* libron prezentas al ni F. ino *Šupichová* sub la nomo: *Legu kaj parolu!* Esperanta legolibro, ankaŭ ĉe Solc & Simáček. Sur 208 paĝoj, formato 12x19 cm troviĝas 100 prozaĵoj kaj poemoj, duone el ĉeĥaj aŭtoroj aŭ originaloj de ĉeĥaj esperantistoj, alia duono estas prenita el plej diversaj lingvoj. La materialo do tre varia, kiu kontentigos ĉiun, kiu trastudinte gramatikon deziras pliprefektiĝi en la lingvo per interesa leĝaĵo.

La libro parte prezentas antologion el ĉeĥaj aŭtoroj (Vrchlický, Neruda, Březina, Machar, Bezruč, Jirásek, Čech, Sládek, Rais, Zeyer k. a.), alie la redaktantino lasis al siaj kunlaborantoj plenan liberecon elekti aŭtoron, eĉ malpli konatan.

En la antaŭparolo la redaktinto dankas por kunlaboro precipe al samideaninoj Dlouhá kaj Moudrá. Prave, ĉar naŭ tekstoj de la unua kaj sep de la dua formas la trionon de la tradukoj el la ĉeĥa lingvo. Kvar poemoj de D-ro Schulhof konatigas la novajn esperantistojn kun poezia talento de la neforgesebla Pardubic' a samideano: originala poemo: *Vi feliĉaj homoj ĉiutagaj*; traduko el Březina: *Mia patrino*; el Čech: *La frateco*, kaj el Bezruč *Marinjo Magdon*. De prof. Lukáš, kiun ni prave opinias la plej poeta poem-tradukanto, ni legas sole: *La violono de l' cigano*, de Vrchlický. El la du tradukoj de poemo: *Al la patrineto*, de Neruda (unua de Fridrich en Skola esperanta, dua de Lukáš en Progreso) la redaktantino elektis la unuan. Fine, du poemoj de Sládek, trad. de Hromada (*Tomba herbo el Esperanto*, *Kampa vojo el Literatura Mondo*), unu originala poemo de Studničková (*Aŭtuno*), entute naŭ poeziaĵoj por kontentigi la amantojn de rimo-ritma literaturo, krom pluraj aliaj el ceteraj lingvoj.

Sub la prozaĵ tekstoj ni vidas, krom la cititaj, nomojn de Čejka, Krumpholtz, Dr. Kamaryt, H. B. Květoň, M. Krausová kaj multajn aliajn, ĝis nun ne ofte legatajn. Tio estas ĝojiga fakto, tiom pli, ke ĉe pluraj el ili montriĝas talento por flua stilo, fidedela respeguligo de la originalo, sen naciismoj.

Nur unu rimarkon ni volus fari al tradukantoj ĝenerale: ŝparu la afiksojn. La vorto: „nefalsita brilo“ estas same klara kiel „nefalsigita“, sed pli simpla. Simile „vundita“ (anst. vundigita), aperas (aperiĝas), halti (haltiĝi), komplika aŭ komplikita maŝino (komplikigita). Oni diras: mi trovis ion (ne: mi troviĝis ion), brakoj montrantaj la morton (ne montrigantaj), ideo movigadi veturilojn (ne moviĝadi), rekonsciigi al si ion (ne rekonsciigi). „Světový názor“ ne estas tradukebla per „tutmonda opinio“, sed almenaŭ:

„primonda opinio“. La uzo de la vorto „komitato“ por „distrikto“ ne ŝajnas al ni rekomendinda.

Preseraroj estas malmultaj, kaj plejparte facile korekteblaj de la leganto. Por utili al la legonto ni indikas kelkajn, kiuj povus konfuzi lin: leontodo (anst. leontono, paĝo 45, linio 19 de malsupre), imponanta (anst. impozanta, 98, 16 supre), fendeto (anst. fundeto, 102, 8 s.) Johanĉjo kuntirinta sin (anst. kuntirita, 120, 9 s.), super kampoj vivoplenaj (anst. kantoj, 127, 6 ms.), harkfendis (anst. halfendis, 162, 14 ms.), kunlabori ne nur, sed ankaŭ (175, 4 ms.). — (Daŭrigo.)

**Kursa Lernolibro**, iaŭ praktika metodo. D-ro Edm. *Privat*. 6-a eldono. 1926. Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin. 80 p., 11x16 cm. Prezo 0.80 RM (6.40 Kč).

Nova eldono de la fame konata lernolibro, ankaŭ en nia lando multe uzata, kies speciala utilo estas paroliga metodo, kiu ebligas per nemultaj vortoj lernotaj krei frazojn (demandojn kaj respondojn) jam de la unuaj lecionoj.

**Karlo**. Facila legolibro. D-ro Edm. *Privat* 9-a eldono, 1926 Sama eldonisto. 48 p., 11x16 cm. Prezo 0.50 RM (4 Kč).

La enhavo de la legolibreto estas serio de artikoloj priskribantaj vivon de Karlo kaj ebligantaj tiel, ke la lernanto konatiĝas kun esp. esprimoj de multaj flankoj de la homa vivo.

**Esperanto-Leitfaden für den Kaufmann**. Max *Butin*. Ellersiek & Borel, Berlin. 1926. 64 p. 12x18 cm. Prezo: 1 RM (8 Kč).

Taŭga libreto por tiu, kiu volas lerni eson por celoj de komercisto. La vorta trezoro, per kiu la teoriaraj klarigoj estas ekzemplataj konsistas el fakaj terminoj komercaj.

**Elektita Esperanta Legaĵo** por komencantoj kaj kursoj. D-ro Emil *Pfeffer*. 1936 Eld. Paul Knepler, Wien. 32 p., 13x18 cm. Prezo 0.50 fr. sv. (3.50 Kč). Teksto kun germana interlinia traduko kaj klarigoj.

## Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

**Ŭspĉhy esperantské veletržní propagandy.** Lipský veletrh používá již po několik let ve styku s cizinou esperanta. Sumy, které veletržní správa obĉtuje k vydání pěkných propagačních spisů esperantských, se dobře vyplácí, neboť rozesílá do 32 zemí tyto stejné tiskopisy. Veletrh ve Frankfurtu hlásí dokonce, že esperanto jest na čtvrtém místě mezi jazyky, kterými dopisuje s cizinou.

**Bulharská vláda trvale pro esperanto.** Bulharské ministerstvo vyučování doporučilo zvláštním obĉězníkem všem školním knihovnám v zemi předplacení časopisu bulharských esperantistů. Bulharské úřady přejí tedy rozšíření esperanta mezi obyvatelstvem stejně jako dřívější tamní vláda.

**Esperanto ve službách vědy.** Nově založený archeologický časopis *Revue de Musées et Collections archéologiques* v Dijonu vydal esperantem psané vyzvání k archeologům celého světa, aby mu zaslali zprávy o nových vykopávkách a nálezích a vůbec své odborné práce k uveřejnění. Redakce časopisu nastoupila správnou, ba téměř jedinou cestu k získání spolupracovníků ve všech zemích.

**Esperanto mezi politickými vězni v Litvě.** Ve vězení pro politické provinilce v Kaunas zahájil litevský spisovatel Adamovski kurs esperanta a má 24 žáky. Adamovski přeložil ve vězení své dílo: Tajemství bible, jež bylo zakázáno litevskou vládou, do esperanta a hodlá učinit je tímto způsobem přístupným čtenářstvu celého světa. Jiný politický vězeň sestavil tam velký slovník esperantský o 50.000 heslech s ruským, německým a židovským překladem.

**Město Budapešť subvencuje esperantskou organizaci.** Správa městské knihovny budapeštské věnovala značnou částku ke zřízení esperantského oddělení v této knihovně a zároveň maďarský dělnický svaz esperantský v Budapešti na návrh soc. demokratických členů městské rady peněžitou podporu k usnadnění další činnosti. Jmenovaný svaz vyučoval minulého roku asi ve 100 kursech 2200 dělníků esperantu a neustává ve své práci přes mnoho překážek, které jsou mu kladeny v cestu. V několika případech bylo nutno zakročiti v maďarském parlamentě, aby byla učiněna přítrž svěvolnému jednání policie.

**Esperantský odznak policistů.** Pruské ministerstvo vnitra vydalo výnos, kterým nařizuje, aby policisté ovládající esperanto nosili na svém stejnojmenném příslušný odznak. Ministerstvo si vyžádalo též jejich seznam.

**Spolupráce esperantských časopisů.** Časopis severoamerických esperantistů navrhl redakci esperantských listů v různých zemích výměnu příspěvků, takže by americký list uveřejňoval ve větší míře než dosud původní práce zahraničních esperantistů a překlady z literatur jejich národů, za což by dostávaly časopisy v oněch zemích příspěvky amerických esperantistů. Americký list hlásí, že obdržel již z několika zemí souhlas z Litvy, z Mexika a od nás z Československa již příspěvky, jež budou v nejbližší době uveřejněny. Taková výměna, kterou zúčastněné listy nabývají značně na ceně, jest tak snadno možná ovšem jen mezi časopisy esperantskými, kde možno použití stejně práce z kterékoli země.

**Anglický dělnický tisk pro esperanto.** Anglickými dělníky jest stále silně pocíkována potřeba mezinárodního jazyka. Jejich vůdci zdůrazňují jeho nutnost a Daily Herald, oficiální orgán britské dělnické strany přináší nyní často články o esperantu.

**Esperanto na ostrově Samos.** Na řeckém ostrově Samos esperanto brzy zakořenilo. Již dávno před válkou zavedla samoská vláda esperanto do škol a knižně tohoto ostrova, jenž sám ovládal tento jazyk, pomáhal, aby se znalost esperanta stala rychle všeobecnou. Po válce byla na Samosu, který byl připojen k Řecku, zahájena starými pracovníky opět pilná činnost, kterou tamní listy vesměs podporují. V bývalé sněmovně byly tam konány nedávno slavnostní zkoušky při ukončení esperantského kursu. Bylo rozděleno mnoho diplomů o znalosti esperanta.

**Esperanto na Aljašce.** Účastníci XIV. světového kongresu esperantského, jenž se konal před třemi lety ve Finsku, byli příjemně překvapeni, když našli při výpravě Laponskem v přístavě Petsamo (dříve Pečeněga) na Bílém Moři, osoby které mluvily plyně esperantem. Nyní dochází zpráva, že i v Americe proniklo esperanto až do nejzazších koutů. Severo-americký svaz esperantský dostává objednávky esperantských učebnic z města Nome na Aljašce. Zájem o mezinárodní jazyk tam šíří člen jmenovaného svazu Peter T. Wyants.

## Opatříme Vám následující knihy:

Fundamento eldono 5 lingva . . .	Kč 6—
Fundamento, kun ĉeĥa trad. . .	3—
Fundamenta Krestomatio . . .	20—
Fabeloj de Andersen . . .	12—
Georgo Dandin . . .	6—
Hamleto, Shakespeare, 170 str. . .	10—
Ifigenio, Goethe, 108 str. . .	12—
Proverbaro esperanta, 82 str. . .	10—
Rabistoj, Schiller, 144 str. . .	12—
Revizoro, Gogol, 100 str. . .	12—
Rabeno de Baharah . . .	8—
Marta . . .	20—
Eliro, Levidojpo . . .	6—
Sentencoj de Salomono . . .	4—
Predikanto . . .	2—
Lingvaj respondoj . . .	10—
Faraono, Bol. Prus, 3 sv. 600 str. . .	38—
Pola Antologio, krátké povídky . . .	6—
Halka, opera, text . . .	4—
Interrompita kanto . . .	3—
Makbeto, Shakespeare . . .	8—
Mazepa, Slowacki, tr. Grabowski . . .	6—
Imenlago, novelo de Storm, 34 str. . .	3—
Kaatje, el la flandra 111 str. . .	8—
Fatala ŝuldo, teosofický román 318 str. . .	10—
Reĝo Judea . . .	18—
Monadologio de Leibniz 31 str. . .	2—
Vortfarado, de Ĉefeĉ . . .	4—
Vortaro de oficialaj radikoj de Cart, 32 str. . .	1:50
Klasika libro de esp-o, 120 p. . .	5—
Bulgara lando . . .	12—
Bulgara Antologio . . .	30—
Kataluna Antologio . . .	70—
Rakontoj de Arbes, 135 str. . .	6—
R. U. R. Čapek . . .	13—
Ĉeĥa literaturo. Dr. Novák Arne Vade-Mecum de Int. Farmacie, Rousseau, 228 p. . .	8— 24—
La Esperantisto en Germanio . . .	20—
Moravia karsto . . .	5—
Titl: Vortaro esp. ĉeĥa v. . .	7—
Kühnl-Procházka: Slovník česko-esp. . .	18—
Čánský-Riedl: Slovník esp.- český . . .	18— 20—
Kabe: Enciklopedia vortaro, 175, v. . .	18—
Boirac: Plena vortaro esp. 3 sv. . .	38—
Wüster: Maŝinfaka vortaro . . .	15—
Bednář: Učebnice esperanta . . .	12—
Kamaryt: Jazyk mezinárodní . . .	8—
Kotzin: Na obranu esperanta . . .	3—
Šupichová: Učebnice esp. . .	9:60
" Kniha konversace . . .	9:60
" Legu kaj parolu . . .	16—
Žďárský: Učebnice esp. . .	20—
Bouška: Škola esperanta, úplná . . .	30—

Obstaráme za předem zaslaný obnos.  
Žádejte složenku.

**LA PROGRESO, Praha VII., Sochařská 333.**